

ESPERANTO en INDONEZIO

neregula bulteno

Provnumero

julio 2011

Anstataŭ kolofono

Ĉi tiu bulteno estis redaktita de kolektivo de volontuloj en Indonezio kaj Eŭropo. La plejparto de la kunlaborantoj kaj redaktantoj estas kontaktebla per la adreso: redakcio-ideo@googlegroups.com. Por faciligi la kontaktojn inter indoneziaj esperantistoj kaj iliajn kontaktojn kun eksterlandanoj, ĉi-sube ni aperigas liston de personoj, kiuj permesis al ni diskonigi iliajn kontaktojn. Estas tute malpermesate sendi spamojn al iliaj poŝtelefonoj kaj/aŭ retadresoj. La listo estas alfabeto, laŭ la loĝloko.

Batam: s-ino *Endang Sabrina*, ☒ Perumahan Sierra Blok A 45, Batu Aji, Batam. ✆ 08566203167.

☒ sabrinaissmart@hotmail.com.

Bekasi: s-ino *Sondang Ili Sumilfia Dewi*, ☒ Perumahan Pejuang Pratama Blok L 11, RT/RW: 003/006, Jl. Pratama IV, Bekasi Barat 17131. ✆ 08111773387. ☎ 0218870835.

☒ ilia.dewi@gmail.com.

Jakarta: s-ro *Pryo Handoko*, ☒ Jl. Gelong Baru Selatan III/12, Tomang, Jakarta 11440.

☎ 085717358267. ☎ 021-5680108.

☒ henkelpryo@yahoo.com

Jakarta: s-ino *Edwina Roemavanti Augstar (Acy)*, ☒ Perumahan Susun Kebon Kacang, It. 1, Blok 6 4, RT/RW: 012/001, Jl. Kebon Kacang XI, Tanah Abang, Jakarta.

☎ 081288030508. ☒ achy681@

yahoo.com.

Malang: s-ino *Mega Karisma Verina*, ☒ Khasan / Mega Karisma Verina, Jl. Teluk Pelabuhan Ratu 101 A RT 6 RW 2, Malang 65124. ✆ 082131544016. ☎ chan.chubby@yahoo.co.id.

Medan: s-ro *Reza Pahlevi*, ☒ Jl. Madiosantoso 165, Medan Timur 20239. ✆ 08566144933. ☒ zhalefy@gmail.com.

Semarang: s-ro *Imam Prayogo*, ☒ Jl. Cinde Raya Timur Atas 41, Jomblang-Candisari, Semarang. ✆ 0817290072. ☎ oceanakunt@yahoo.com.

Wonogiri: s-ro *Hanung Prakoso*, ☒ verdastel@gmail.com.

Yogyakarta: s-ro *Rahmat Hidayat*, ☒ Jl. Kaliurang KM 7 Gang Melati II 4A, Sleman, DI, Yogyakarta 55283. ✆ 085292024964. ☎ dreal_milanisti@yahoo.com.

Pembaca yang budiman, Karaj legantoj,

yang ada di tangan anda adalah buletin dari para penutur bahasa Esperanto di Indonesia. Dengan kebahagiaan yang mendalam kami esperantis Indonesia menuliskan beberapa patah kata dalam rangka penerbitan buletin edisi pertama ini yang diterbitkan pada milenium ketiga. Kami menghadapi beberapa kendala ketika menyusun buletin ini. Pertama, karena kenyataan bahwa bahasa Esperanto bukanlah bahasa yang populer di Indonesia meskipun ia telah dikenal di Indonesia sejak lebih dari satu abad yang lalu. Kedua, karena kenyataan bahwa kemampuan esperantis Indonesia dalam penggunaan bahasa Esperanto masih terbatas. Namun demikian, kami telah berhasil menerbitkan buletin ini. Buletin ini disusun dalam kejaran waktu yang sangat singkat dan dengan tema yang beragam. Kami mohon maaf atas hal ini dan atas kesalahan (bahasa dan gaya) yang ada di dalam buletin ini.

Bahasa Internasional Esperanto, secara singkat adalah bahasa bagi perdamaian dan kerjasama antar penduduk dunia di dalam milenium ketiga ini dan Indonesia adalah negara yang sedemikian besar yang harus memperoleh tempat yang sesuai dalam keluarga besar bangsa-bangsa di dunia. Hal itu juga berlaku dalam Bahasa Internasional Esperanto dan antar para pemakainya.

Sebagai penutup, kami ingin berterima kasih kepada teman-teman esperantis Indonesia yang telah menjadi kontributor dalam buletin ini. Kami pada awalnya berencana membuat buletin Klub Esperanto Jakarta, tapi akhirnya karena yang menolong begitu banyak orang dari kota-kota lain sehingga ia menjadi buletin Esperanto Indonesia. Apabila kerjasama ini dapat terus berlanjut, maka buletin ini dapat diteruskan di bawah bendera tersebut, dan mungkin akan menjadi platform buat gerakan nasional Esperanto di Indonesia, yang nantinya menjadi Asosiasi Nasional Esperanto di Indonesia. Terima kasih juga kepada Heidi Goes dan Ionel Oneț atas bantuan dan dukungannya sehingga buletin ini dapat diterbitkan.

jen en viaj manoj estas bulteno de la indoneziaj esperantistoj. Kun granda ĝojo ni, indoneziaj esperantistoj, skribas kelkajn vortojn okaze de la eldono de la unua indonezia Esperanto-bulteno en la tria jarmilo. Ni alfrontis multajn malfacilaĵojn pretigante ĉi tiun bultenon. Unue, pro la fakto ke Esperanto ne estas populara lingvo en Indonezio kvankam ĝi estas konata en nia lando de antaŭ pli ol jarcento. Due, pro la fakto ke la Esperanto-nivelo de la indoneziaj esperantistoj ne jam estas sufiĉe alta. Tamen ni sukcesis eldoni ĉi tiun bultenon. Ĝi kunmetiĝis sub tempopremo kaj ĝia temaro estas iom miksitita. Pardonu nin pro tio kaj pro la eventualaj (lingvaj kaj stilaj) eraroj en ĝi.

La internacia lingvo Esperanto estas, en nur kelkaj vortoj, la lingvo por paco kaj kunlaboro inter ĉiuj popoloj en la 3-a jarmilo, kaj Indonezio estas tiom granda lando, ke ĝi devas akiri sian ĝustan lokon en la monda familio de la nacioj. Tio okazu ankaŭ per la internacia lingvo Esperanto kaj inter la parolantoj de Esperanto.

Por fermi la enkondukon, ni volas danki al la Esperantaj amikoj en Indonezio kiuj jam kontribuis al ĉi tiu bulteno. Ni volis fari bultenon de la Ĝakarta klubo, sed fine kontribuis tiom da amikoj el aliaj urboj, ke ĝi iĝis vere indonezia E-bulteno. Se daŭras tiu kunlaboro, la bulteno povos daŭri sub tiu flago kaj eventuale iĝi platformo por nacia agado kiu konduku al nacia asocio. Multan dankon ankaŭ al Heidi Goes kaj Ionel Oneț pro iliaj helpo kaj subteno en la aperigo de ĉi tiu bulteno.

*Abdul Haris Adnan, presiden/prezidanto
Ili Sumilfia Dewi, sekretaris/sekretario
Klub Esperanto di Jakarta "Esperiga suno"/
Esperanto-klubo de Ĝakarta "Esperiga suno"*



Lernantoj en Yogyakarta, nov. 2009

Kiel esploroj kondukas al vigligo de moderna movado

Heidi Goes

Esplorante pri la Esperanto-movado en Indonezio mi malkovris ke inter la du mondmilitoj kaj post la dua mondmilito ĝis komence de la 1960aj jaroj, la movado en tiu lando estis vigla. Ekde tiam, nur la Indonezia E-Societo en Semarang iom aktivis de 1990 ĝis 2007. Krom tio estis en Indonezio ĉi-jarcente nur kelkaj unuopuloj kiuj solaj eklernis Esperanton. El tiuj, du faris pli ol tion.

Hazairin R. Junep starigis Centron por Esperanto-Studoj en sia hejmo en Yogyakarta, kaj en 2007 publikigis Esperanto-indonezian vortaron. En la sama urbo Yohanes Manhitu komencis verki poemojn en Esperanto, kiujn vi povas legi en lia blogo (<http://ymanhitu-poemoj.blogspot.com/>) kaj ankaŭ en lastatempe eldonita poemaro (vd. p. 6). De Yohanes aperis ankaŭ *Multlingva Frazlibro* (vd. p. 8).

Pro miaj esploroj, mi decidis viziti Indonezion en 2009. Dum mi preparis la vojaĝon, Lee Jungkee, tiam la prezidanto de KAEM (Komisiono por la Azia E-Movado) proponis al mi ankaŭ instrui tie. Ĝus antaŭ mia ekvojaĝo aperis indonezia ŝlosilo (vd. p. 4), kiu multe helpis dum tiu instruado. Helpis en la preparo de la ŝlosilo Bobby Mulyadi el Jakarta.

En tiu unua instruvojaĝo, mi instruis Esperanton al preskaŭ 500 lernantoj en 6 urboj: Batam, Jakarta, Bogor, Bandung, Semarang kaj Yogyakarta. Mi vidis ke Esperanto havas ŝancon kreski tie kaj, reveninte, mi kreis Facebook-paĝon por indoneziaj esperantistoj kaj ankaŭ alimaniere daŭre restis en kontakto kun multaj el miaj lernantoj. Sekvajare, en 2010, mi reiris kaj denove instruis, nun al pli ol 600 lernantoj, dum dekoj da horoj da enkondukaj lecionoj, en ok urboj (la ses urboj el la antaŭa vojaĝo, kaj aldone en Medan kaj Surabaya, respektive la dua kaj tria plej grandaj urboj en la lando). En ambaŭ vojaĝoj mi sukcesis renkonti kelkajn veteranojn (kiuj lernis

Esperanton en la jaroj 1950-60), kelkfoje en tute neatenditaj lokoj, kiel en la Monda Vegetarana Kongreso, aŭ en privata biblioteko kie mi serĉis artikolojn pri Esperanto en malnovaj gazetoj. Ke eblas hazarde renkonti esperantistojn en Indonezio, kiuj lernis la lingvon antaŭ tiom da tempo, montras ke vere multaj homoj tiam lernis ĝin,

kaj tio grandparte ŝuldiĝas al s-ino Chailan Sjamsoe Rankajo Datoe Toemenggoeng. Ŝi instigis la kreadon de pluraj kluboj, disdonis tie diplomojn, kontribuis al la publikigo de kelkaj lernolibroj kaj vortaroj en tiu periodo ktp.

Pluraj ne-indonezianoj ankoraŭ memoras ŝian partoprenon en kelkaj Universalaj Kongresoj, sed ŝi ankaŭ vizitis la faman Esperanto-eksponon en Montevideo en 1954, kaj rondvojaĝis per Esperanto kaj vizitis survoje klu-

bojn, ekz. tiun de Novjorko (vd. p. 5).

Kaj nun? Nun estas jam kelkaj kluboj en Indonezio, kaj en tiuj de Jakarta ("Esperiga suno") kaj Bogor ("Ĉielarka revo") okazas regule lecionoj (vd. p. 7). Haris Abdul, prezidanto, kaj Ilia Sumilfia Dewi, sekretario de "Esperiga suno", subvencite de KAEM, povis en decembro 2010 partopreni la Komunan Seminarion, en kiu partoprenis junuloj el kelkaj aziaj landoj.

Krome, dum mi verkas ĉi tion, ni atendas esperplene pozitivan respondon al la vizopetoj de Ilia Sumilfia Dewi kaj Endang Sabrina Sitompul, kiuj volas partopreni la Universalan Kongreson en Kopenhago. Por helpi ilin pluraj homoj jam donacis, foje grandajn sumojn. Ni tre kore dankas ilin. Ĉi tiu revuo estas eta signo de nia dankesprimado al ili; samtempe ĝi volas informi vaste pri la kreskanta movado en Indonezio. Ĝuu la bultenon, eĉ se vi ne ĉion komprenas. La indoneziaj partoj ja estas tie pro tio ke la bulteno ankaŭ uzeblu kiel varbilo en Indonezio. Laŭeble ni provis zorgi pri tradukoj resumaj.



Informriĉa retpaĝo

Ekde la fino de julio 2010 ekzistas retpaĝo pri Esperanto por indonezianoj kaj por esperantistoj kiuj interesiĝas pri la indonezia E-movado: <http://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/>.

En ĝi oni povas trovi informojn en la indonezia pri tio kio estas Esperanto, kiel lerni ĝin (kun ligiloj al interesaj retejoj kaj elŝuteblaj lerniloj kiel ekz. la frazaro de Yohanes Manhitu kaj la ŝlosilo), bibliografiajn informojn pri artikoloj kiuj aperis en Esperantujo kaj en Indonezio pri la du instruvojaĝoj de Heidi Goes en Indonezio (kaj parte la artikolojn mem en pdf), fotojn pri tiuj vojaĝoj, blogon, informojn pri la historio de la movado en Indonezio kaj ligilojn al la diversaj Facebook-grupoj (por la lando kaj por diversaj urboj).

Sudah ada website tentang Esperanto dari bulan juli 2010 buat orang Indonesia: <http://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/>. Bisa dapat informasi tentang bagaimana belajar Esperanto, tentang sejarah gerakan Esperanto di Indonesia, baca artikel¹ tentang kursus² Esperanto di Indonesia, buku² pelajaran, dll.

Esperanto jam renkontigis min kun bona amikino

Lerni Esperanton estas grava momento en mia vivo. Mi ne sciis, kio estas Esperanto ĝis mi legis mesaĝon sur la paĝaro de Couchsurfing, ke virino el Belgio volas instrui Esperanton en Indonezio.

Mi interesiĝis kaj scivolis pri tio. Tiutempe mi helpis ŝin fari mallongan kurson en Ĝakarta. En du tagoj en semajfino, mi kaj 13 aliaj partoprenantoj ricevis enkondukan kaj bazan lecionojn. Sed tiutempe mi ankoraŭ pensis ke Esperanto estas malfacila. Tamen mi eklernis sola kaj provis inviti geamikojn por lerni Esperanton kune. Bedaŭre ne eblis daŭrigi la kunstudadon, ĉar la lernantoj ne volis lerni pro diversaj kialoj. Pro tio mi komencis perdi mian volon plu lerni Esperanton.

Sed poste mi ricevis mesaĝon ke la virino el Belgio volas reveni al Indonezio kaj instrui por la dua fojo. Mi reakiris la kuraĝon kaj reeklernis Esperanton. Dum kelkaj tagoj mi akompanis ŝin kaj kunlaboris kun ŝi por Esperantaj kurso kaj seminario. Mi tre inspiriĝis el ŝiaj klopodoj instrui indonezianojn pri Esperanto. Por mi ŝi ne nur estas mia instruintino sed ankaŭ mia bona amikino. Mi kore dankas al ŝi, kiu donas al mi novan sperton per Esperanto.

Miaj linioj estas dediĉitaj al ŝi: Heidi Goes.

Ilia Sumilfia Dewi

Esperanto telah mengubah hidup saya

Abdul Haris Adnan

Jujur saja saya tidak pernah tahu sebelumnya kalau ada bahasa yang bernama Esperanto. Seperti kebanyakan orang, ketika pertama kali mendengar bahasa Esperanto yang ada di benaknya adalah pertanyaan: Esperanto itu bahasa dari negara mana? Ya memang pada umumnya masyarakat kita selalu mengaitkan suatu bahasa dengan dengan negara atau suku tertentu. Misalnya bahasa Jepang adalah bahasa yang digunakan secara resmi di Negara Jepang dan bahasa Jawa adalah bahasa suku Jawa yang berada di Indonesia (meskipun bahasa Jawa bukanlah bahasa resmi di negara manapun). Perkenalan saya dengan bahasa Esperanto terjadi ketika pada sekitar tahun 2005 saya membeli sebuah *Compact Disc* komputer tentang belajar berbagai bahasa. Salah satu bahasa yang menjadi pilihan di dalamnya untuk dipelajari adalah bahasa Esperanto dengan simbol bendera bintang hijaunya. Bahasa lainnya diwakili oleh bendera dari negara di mana bahasa tersebut menjadi bahasa resmi di sana.

Setelah melihat bendera bintang hijau, timbullah pertanyaan dalam benak saya: ini bendera negara mana? Saya pun mencari di dalam buku pintar yang saya punya. Satu per satu gambar bendera yang ada di dalam buku tersebut saya cocokkan dengan bendera bintang hijau dan hasilnya nihil. Bendera bintang hijau bukanlah bendera suatu negara manapun di dunia ini. Akhirnya saya pun memutuskan untuk mencarinya menggunakan mesin pencari Google. Satu per satu tautan yang muncul saya klik dan informasi di dalamnya pun saya baca dan pahami. Inilah pertama kalinya saya mengenal bahasa buatan (*artificial language*) atau bahasa pengganti (*auxiliary language*).

Dengan rasa keingintahuan yang besar saya pun mencoba mempelajari bahasa Esperanto secara online. Saya pun mendaftar di lernu.net. Kursus di lernu yang pertama kali saya coba adalah "Vojaĝu kun Zam". Selain di lernu! saya juga mempelajari Esperanto melalui kursus korespondensi di ELNA. Pembimbing saya saat itu adalah Detlef Karthaus yang tinggal di Toronto, Kanada. Satu hal yang menjadi pendorong saya mempelajari bahasa Esperanto di ELNA adalah adanya sertifikat yang akan diberikan setelah saya menyelesaikan kursusnya. Bagi saya sertifikat ini merupakan hal yang cukup berharga untuk memperindah *Curriculum Vitae* ketika saya menulis surat lamaran pekerjaan suatu saat nanti.

Hari demi hari, pelajaran demi pelajaran saya ikuti sampai akhirnya kursus tersebut bisa saya akhiri. Dan saya pun mendapatkan sertifikatnya. Setelah itu saya vakum dari dunia Esperanto karena tidak ada orang bisa saya ajak ngobrol dalam bahasa Esperanto di sini. Sampai di awal tahun 2010 saya menemukan halaman Esperanto Jakarta di *facebook* dan juga *mailing list*-nya di Yahoo. Di sinilah saya pertama kali berkenalan dengan Heidi Goes, seorang esperantis asal Belgia yang rupanya telah datang ke Indonesia setahun sebelumnya, yakni tahun 2009. Di tahun itu juga rupanya ia telah memperkenalkan dan mengajari bahasa Esperanto di berbagai kota di Indonesia. Akhir 2010 ia datang lagi ke Indonesia untuk mengajarkan bahasa Esperanto kembali. Di sinilah saya pertama kali bertatap muka langsung dengan dia.

Setelah berkeliling ke beberapa kota di Indonesia, Heidi membuat klub Esperanto di berbagai kota di Indonesia sebelum ia pulang kembali ke Belgia. Di tengah hujan deras yang turun di Jakarta, akhirnya pada tanggal 3 Oktober 2010 berdirilah klub Esperanto di Jakarta dengan nama "Esperiga suno" dan saya menjabat seba-

gai ketuanya. Pada saat yang bersamaan di Hanoi, Vietnam akan diadakan Komuna Seminario yang ke-29. Dengan bantuan Heidi menuliskan proposal ke KAEM akhirnya dua orang dari Indonesia berhak mendapatkan subsidi untuk menghadiri acara ini, saya adalah satunya.

Saya sangat senang mendapat kesempatan ini. Saya belum pernah bepergian ke luar negeri sebelumnya, jadi saya harus membuat passport dan untungnya Vietnam adalah sama-sama negara anggota ASEAN sehingga warga Negara Indonesia tidak memerlukan Visa. Selain menyiapkan dokumen yang diperlukan saya juga menyiapkan diri saya dengan kemampuan bahasa Esperanto yang masih sangat dasar dan sudah tiga tahun tidak saya pergunakan. Saya kembali membaca-baca materi yang pernah saya pelajari dulu. Saya juga kembali membuka situs lernu!. Untungnya saya masih ingat username dan password saya. Untungnya juga account saya di lernu.net tidak hilang. Selain dengan belajar sendiri, saya juga menyadari agar suatu ilmu tidak hilang maka saya harus mengamalkan ilmu tersebut ke orang lain. Dikarenakan sudah ada klub Esperanto Jakarta maka saya pun menyempatkan diri mengajarkan bahasa Esperanto kepada teman-teman anggota klub. Dengan cara ini, selain mengajar saya juga sekalian belajar dan apa yang telah saya pelajari akan tetap ingat dan tidak lupa. Berkumpul dan belajar Esperanto bersama adalah juga merupakan kegiatan rutin klub yang diadakan setiap dua pekan sekali.

Di Vietnam saya menandatangani pengalaman yang sangat berharga. Saya berkenalan dengan esperantis dari Cina, Jepang, Korea dan Vietnam sendiri sebagai tuan rumah. Saya sangat kagum dengan kemampuan bahasa Esperanto mereka yang jauh di atas saya. Saya juga kagum dengan pergerakan Esperanto di negara-negara tersebut yang ternyata sudah ada sejak lama, bahkan di Cina sudah ada stasiun radio yang menyiarkan dalam bahasa Esperanto dan didukung oleh pemerintah Cina. Hal yang sangat kontras dengan kondisi di Indonesia. Inilah tantangan bagi saya, bagi teman-teman di klub, bagi kita semua untuk lebih mempopulerkan bahasa Esperanto kepada masyarakat Indonesia. Saya tidak ingin ada lagi orang yang ketika ditanya apakah ia mengetahui bahasa Esperanto kemudian malah balik bertanya: "itu bahasa dari negara mana?"

Di mulai dari minat mempelajari berbagai bahasa yang ada di dunia saya membeli sebuah CD komputer tentang belajar bahasa-bahasa. Dari banyak bahasa yang ada di dalam CD itu entah mengapa saya tertarik kepada Esperanto. Dengan hanya sekedar ingin tahu saya pun mempelajarinya sendiri via internet. Siapa sangka hal sekecil ini menyebabkan saya jadi bisa berkenalan dengan berbagai teman dari seluruh dunia. Dengan Esperanto, saya seolah-olah menemukan keluarga baru yang selama ini ada namun tersembunyi. Keluarga esperantis yang anggotanya dari seluruh dunia dengan semangat persahabatan dan perdamaian. Esperanto telah mengubah hidup saya.

Unue mi nenion sciis pri Esperanto ĝis iun tagon mi aĉetis komputilan KD pri lingvo-lernado. Mi trovis la verda-stelan flagon por Esperanto. Kun scivolo mi memlernis kaj serĉis informojn pri Esperanto en la reto. Mi registriĝis en lernu! kaj por la koresponda kurso de ELNA. Fine mi fariĝis klubestro kaj havis ŝancon ĉeesti la komunan seminarion en Hanojo, Vjetnamio, en decembro 2010. Esperanto jam ŝanĝis mian vivon.

Seminario pri Esperanto en la Universitato Gunadharma

Ravi Ahmad Salim

(Parte verkita laŭ la artikolo de Eka Ardhinie, studentino pri literaturo en la Universitato Gunadharma, por Jurnal Bogor de la 20a de oktobro 2010.)

La 15an de oktobro 2010 okazis granda kunveno en la Kampuso D de la Universitato Gunadharma, Depok, Okcidenta Javo, kiun partoprenis centoj da personoj. La kunveno estis seminario kun la titolo "Esperanto and the Importance of Language in the IT Era" (Esperanto kaj la graveco de lingvo en la informadika epoko). Estis du parolantoj. La unua estis d-ro Rita Johan de la departemento de (angla) literaturo, kiel surloka parolanto, kiu parolis pri la graveco de la scio de lingvoj krom la angla, precipe de gravaj lingvoj, kiuj taŭgas esti internaciaj lingvoj, kiel Esperanto. La dua parolanto estis la belga esperantistino Heidi Goes,

kiu klarigis pri la detaloj de la internacia lingvo. La seminario ricevis bonan eĥon ĉe la publiko kaj ankaŭ igis kelkajn personojn interesiĝi pri la lingvo.

Mi mem nur malfermis la seminaron kiel la vic-rektoro por fakaj aferoj kaj donis iomete da bongustaĵoj informante ke Esperanto estas facila ĉar ĝi povas esti lernata en nur kelkaj monatoj, se ne pli rapide. Ĝi lernindas ne nur pro sia facileco sed ankaŭ pro la travidebleco de siaj gramatikeroj sen komplikaj, dum aliaj lingvoj ne havas ĉi tiujn faciligajn trajtojn. Plie, Esperanto havas multajn vortojn kiuj estas jam konataj de la internacia komunumo. Per lernado de

Esperanto oni povas kompari la lingvon kun iu ajn lingvo kiun oni volas lerni. Do ĝi faciligas la lernadon de aliaj lingvoj. La vorto "Esperanto" en la titolo de la seminario eble scivolemigis la studentojn por partopreni ĝin. Do la partoprenantoj estis tre multnombraj.

D-ro Rita Johan, kiu estas instruisto de fonologio, diris ke en nia tempo estas nature ke oni ellernas lingvojn. Multe da personoj lernis malfacilajn lingvojn. Do pli indas lerni Esperanton por uzi ĝin por plimultigi siajn amikojn aŭ studi kelkajn kulturojn.

S-ino Goes konigis Esperanton al la aŭskultantoj kaj estis ŝi kiu kondukis la seminarion plejparton de la

tempo. Ŝi klarigis la elementojn de la lingvo kaj ĝian elparolon. Poste ŝi parolis iomete ankaŭ pri la historio de la Esperanto-movado en Indonezio, montrante fotojn de eventoj kaj gravaj personoj. Mankis kelkaj detaloj pri la historio, ekzemple pri s-ino Chailan Sjamsoe Rankajo Datoe Toemenggoeng, kiu estis la motoro de la movado en Indonezio inter 1950 kaj 1962. Ŝi forpasis en 1962 sed ŝiaj infanoj estas serĉataj por intervjui ilin pri la patrino.

Esperanto estas lingvo lerninda kaj uzinda de ĉiuj kie ajn kiel internacia lingvo. La rezonado de tiu ĉi frazo eble ŝanĝiĝas de tempo al tempo, sed la vero kiun ĝi entenas ne ŝanĝeblas.



Tentang Kunci Esperanto

Esperanto merupakan sebuah bahasa internasional yang diciptakan oleh dr. L.L. Zamenhof. Tata bahasanya lebih sederhana dan mudah dibandingkan bahasa-bahasa alami (yang sudah ada), sehingga semua orang bisa mempelajari serta menggunakannya dengan sangat mudah.

Esperanto telah ada di Indonesia sejak abad ke-20. Liem Tjong Hie merupakan salah satu esperantis dari Indonesia yang lahir tahun 1906 dan tinggal di Semarang, Jawa Tengah. Beliau bahkan menulis beberapa buku tentang bahasa Esperanto seperti: *Fundamento de Esperanto*, *Selajang Pandang Bahasa Esperanto*, *Koentji Esperanto* (Esperanto-ŝlosilo), dan sebagainya. Sebenarnya, semuanya merupakan buku kecil dan berisi tentang tata bahasa Esperanto serta daftar kata atau kosakata (dari bahasa Esperanto ke bahasa Indonesia).

Pada tahun 2009, Heidi Goes berencana mengajar Esperanto di Indonesia (di beberapa kota) melalui kursus Esperanto. Untuk mendukung rencananya, ia berinisiatif untuk menulis kembali buku *Kunci Esperanto*. Bobby Mulyadi membantunya terutama dengan mengoreksi tentang keterangan dan terjemahan dalam bahasa Indonesia (sesuai dengan Ejaan Yang Disempurnakan – EYD). Selain itu, mereka juga menambahkan beberapa bagian tata bahasa penting lainnya yang tidak terdapat dalam buku-buku karya Liem Tjong Hie.

Sementara untuk bagian kosakata (daftar kata), Heidi menulis kata-kata (Esperanto) serta artinya (terjemahannya). Bobby membantunya untuk bagian terjemahannya dengan cara: membenarkan yang salah, memperjelas atau menerangkan tentang terjemahan, menambahkan terjemahan lain jika ada, dan lain-lain. Beberapa kamus online untuk membantu mencari terjemahan yang tepat, an-

tara lain: <http://www.lernu.net>, <http://www.reta-vortaro.de/revo/>, <http://esperanto-panorama.net/vortaro/eoen.htm>, dan sebagainya.

Pada saat Heidi mengajar pada kursus Esperanto tahun 2009 dan 2010, para hadirin mendapatkan buku *Kunci Esperanto* sehingga mereka bisa mengetahui dan mempelajari bahasa Esperanto.

Bobby Mulyadi

Por siaj enkondukaj E-lecionoj en Indonezio, Heidi Goes (Belgio), kun la helpo de Bobby Mulyadi, kompilis novan, modernan indonezian "ŝlosilon", kiun eldonis *Universala Esperanto-Asocio* en 2009 sub la titolo *Kunci Esperanto*. La 48-paĝa broŝuro enhavas koncizan gramatikon de Esperanto kaj vortliston Esperanta-indonezian, bazitan sur la *Universala Vortaro de D-ro Zamenhof*. La libreto aĉeteblas ĉe la eldoninto kontraŭ 1,20 €.

En la supraj linioj, la aŭtoro klarigas pri la indonezia ŝlosilo kaj pri sia kontribuo al ĝia kompilado.



S-ro Hadi Djuritto volas vendi sian kolekton de malnovaj indoneziaj moneroj kaj monbiletoj cele al investo en Esperantaj agadoj. Petu la ofertoliston de: Hadi Djuritto, Jl. Surabaya 598, Dengok, Padangan, Indonezio; fakso +62 (0)296 423321.

Perjalanan jauh biar dapat keterangan tentang Esperanto

Mega Karisma Verina

Aku Mega, mahasiswi bahasa di Universitas Negeri Malang, Jawa Timur, Indonesia. Di kota ini tempatku mencari ilmu merupakan salah satu kota di Indonesia yang terkenal sebagai kota pelajar. Beberapa Universitas di Malang menjadi pilihan yang menarik bagi calon mahasiswa seluruh Indonesia. Tiap tahunnya puluhan ribu mahasiswa baru datang ke Malang. Aku juga merasa beruntung bisa mendapatkan salah satu bangku universitas di kota ini. Apa yang bisa aku gambarkan tentang Malang, hanyalah mahasiswa dan pelajar. Pergerakan pendidikan sangat pesat disini. Hampir tiap hari dijalan aku melihat spanduk/brosur suatu acara mengenai pelajar atau mahasiswa. Temanya selalu berhubungan dengan pendidikan.

Tetapi, tetap saja ada hal yang kami lewatkan, yaitu bahasa Esperanto. Bahkan mayoritas dari kami terasa asing sekali mendengar Esperanto di telinga kita. Padahal untuk kota pelajar seperti Malang, seharusnya kami punya pengetahuan yang luas tidak hanya teknologi yang mampu dikuasai tetapi juga sejarah yang tidak boleh dilupakan. Ironisnya disini tidak ada satupun mahasiswa ataupun pelajar yang pernah berbicara tentang Esperanto. Mungkin dulunya aku adalah salah satu dari mereka yang tidak mengenal Esperanto, sampai aku mempunyai teman di luar negeri dari salah satu situs jejaring sosial. Aku melihat dia dan beberapa temannya menggunakan bahasa yang sangat tidak aku kenal. Aku begitu penasaran, mungkin hal ini dikarenakan aku sangat tertarik akan bahasa. Baru aku tahu, ternyata itu Esperanto. Aku mencoba mencari informasi tentang Esperanto di internet dan aku merasa sangat menyesal belum pernah mempelajarinya. Bahasa ini memang tua namun sarat dengan sejarah, dulu bahasa ini juga diajarkan di sekolah-sekolah Indonesia dan digunakan untuk menjembatani antara negara-negara yang sedang berperang.

Sejak saat itu aku semakin rajin belajar melalui internet, meski seribu pertanyaan di kepalaku, karena ada beberapa hal yang tidak aku mengerti. Aku tidak menginginkan jika hanya asal berbicara, namun aku juga harus tahu susunan kata (*grammar*) yang benar.

Niatku ingin belajar memang membuahakan hasil, aku dapat kabar gembira bahwa penutur bahasa Esperanto, Heidi Goes, membuka kursus secara gratis di beberapa kota di Indonesia. Awalnya senang sekali rasanya, tapi ternyata bukan kotaku yang akan Heidi datangi. Namun tekadku bulat untuk belajar akhirnya aku tempuh juga ratusan kilometer ke Surabaya. Aku merasa sangat letih akan perjalanan ini, namun semuanya sudah terobati dengan belajar Esperanto bersama Heidi Goes dan teman-teman baru di kursus. Hal terpenting adalah Heidi memberikan aku buku-buku Esperanto yang menjawab semua pertanyaanku sebelumnya ketika belajar melalui internet. Memang saat ini aku masih belum mampu berbicara Esperanto dengan baik karena aku sedang mempelajarinya. Selain itu aku mulai mengenalkan ke teman-temanku apa Esperanto itu. Lagi-lagi ada hal yang mengejutkan bagiku, ada seorang teman yang ingin sekali belajar Esperanto bersamaku. Tentu saja hal ini membuatku semakin semangat untuk lebih giat belajar Esperanto.

Mi estas Mega, studento en la universitato de Malang. Estas multaj eventoj kaj kursoj por studentoj en mia urbo, sed ankoraŭ nenio okazis pri Esperanto. Antaŭ ol konatiĝi kun amiko en iu socia reto ankaŭ mi ne sciis pri tiu lingvo. Mi komencis lerni ĝin per la reto, sed mi havis multajn demandojn, ĉar mi ne komprenis ĉion. Tiam mi aŭdis ke venos esperantistino al Indonezio, sed bedaŭrinde ne al mia urbo. Mi vojaĝis longe, sed valoris la penon pro la lernado kun Heidi Goes kaj pro la novaj amikoj en la kurso. Plej grave, mi ankaŭ ricevis librojn kiuj respondis ĉiujn miajn demandojn. Mi daŭre lernas sed jam konatigas miajn amikojn kun Esperanto. Mi trovis amikon kiu emas lerni Esperanton kun mi, kio igas min des pli fervore lerni ĝin.

PS: Mega faris grupon en Facebook por esperantistoj en Malang. Serĉu en Facebook: 'Esperanto – Malang' (samspeca adreso por ĉiuj urboj kie Heidi instruis).

Skribis Allan Fineberg (Fair Lawn, NJ, Usono) en la Facebook-paĝo de la indoneziaj esperantistoj:

Mi estis ĉirkaŭ 16-17-jaraĝa, en 1958, kiam vizitanto el Indonezio vizitis la Esperanto-Klubon de Nov-Jorko. Ŝi estis ĵurnalistino, el Ĝakarto, mi pensas. Bedaŭrinde mi forĝis ŝian nomon. Sed mi havis la impreson ke ŝi estas iu grava en la indonezia E-movado. Ĉiukaze, ŝi donis bonan impreson pri la tre simpatia indonezia popolo... kie nia Prezidento Obama pasigis kelkajn jarojn de sia junaĝo.

En posta, persona, retmesaĝo al unu el la redaktoroj de ĉi tiu bulteno, li aldonis:

Verdire, mi ne memoras multe pri Datoe Toemenggoeng. Mi estis ĉirkaŭ 16-jaraĝa, kaj nun mi estas 70. Mi daŭre memoras, tamen, ke ŝi tre vigle parolis pri la movado en Indonezio, pri siaj vojaĝ-impresoj vizitinte Esperanto-parolantojn/klubojn en multaj landoj. Ŝi estis tre klera, afabla, amikema persono, kaj donis tre bonan impreson pri la indonezia popolo. Post la parolado, ŝi renkontis la klubanojn kaj amikiĝis kun ili.

Pengalaman Belajar Esperanto

Sebelumnya, saya tidak pernah mendengar tentang Esperanto hingga suatu ketika Heidi Goes datang ke Indonesia dan berniat untuk mengadakan kursus singkat bahasa Esperanto. Informasi tentang kursus singkat tersebut kemudian saya dapatkan di salah satu situs terkenal untuk para traveler/backpacker dimana saya menjadi salah satu anggotanya.

Kesan pertama ketika saya belajar Esperanto adalah tata bahasanya yang menurut saya agak mirip bahasa Jerman dan Prancis, selain itu kosakata Esperanto juga dapat dipahami lebih muda karena kemiripan-kemiripannya dengan beberapa bahasa yang ada di Eropa. Saat belajar Esperanto, saya diperlihatkan beberapa video-video menarik tentang Esperanto dan orang-orang esperantis, terutama saat mereka melakukan pertemuan sedunia dan berkumpul menjadi satu kesatuan. Hal tersebut yang kemudian menjadi motivasi bagi saya untuk bisa terus belajar Esperanto dan suatu saat dapat bergabung di sebuah kongres atau pertemuan dengan orang-orang esperantis sedunia.

Wilton Djaya

Eĥoj en la loka gazetaro

Ne nur en Esperantujo, sed ankaŭ en Indonezio aperis pluraj artikoloj en la loka gazetaro okaze de miaj lecionoj en 2009 kaj 2010. Jen kelkaj eltiraĵoj.

La kurso en la universitato Widyatama de Bandung estis anoncita en la reta ĵurnalo de la universitato. En la paŭzo aperis ĵurnalisto, kiu poste verkis artikolon por *Tribun Jabar*, gazeto de la provinco Okcidenta Javo (22/11/2009). En ĝi oni preparolis la kreon de la lingvo, la uzon, sed ankaŭ la lecionon: "Heidi Goes tentu tak cuma mempresentasikan berbagai hal tentang Bahasa Esperanto. Perempuan berkacamata ini sekaligus membuktikan kepada 150-an peserta kegiatan, bahwa dasar-dasar Bahasa Esperanto begitu mudah dipelajari hanya dalam dua-tiga jam." (Heidi Goes kompreneble ne nur prezentis kelkajn aferojn pri la lingvo Esperanto. Ĉi tiu virino kun okulvitroj samtempe ankaŭ pruvis al la 150 partoprenantoj, ke la bazo de la lingvo Esperanto estas facile lernebla en 2-3 horoj.) Kaj plie: "Praktik dasar bahasa Esperanto terbukti mampu memancing antusiasme peserta. Mereka terdiri dari mahasiswa, dosen, pemerhati bahasa, penggemar sastra, hingga penyuka aktivitas traveling." (La praktiko de la bazo de la lingvo Esperanto pruviĝas kapabla kapti la entuziasmon de la partoprenantaro. Tiu ĉi konsistas el studentoj, docentoj, lingvistoj, kulturŝatantoj kaj ŝatantoj de vojaĝaktivadoj.) Kaj lasta citaĵeto: "Ada beberapa yang lucu. Kata benda rata-rata menggunakan akhiran o, mirip bahasa Jawa atau bahasa Minang." (Estas kelkaj amuzaĵoj. La substantivoj finiĝas per la sufikso -o, kio similas al la lingvo java aŭ minanga.)

En Semarang aperis en *Fordep* kaj *Jateng-info* granda artikolo kun multaj fotoj. La enhavo estis ne pri la lecionoj, sed egalas la tekston de *Esperanto ĝisdate*. La fotoj estis prenitaj el la Facebook-paĝo. La ĵurnalisto lasis la subtitojn en Esperanto.

En la gazeto *The Jakarta Post* aperis en decembro 2009, post mia foriro, artikolo en formo de intervjuo, kun informoj pri Esperanto. Ĝi titoliĝis *Esperanto links people with no common language* (Esperanto ligas homojn sen komuna lingvo) kaj estis verkita tute en la angla.

La lecionoj en 2010 en Batam estis organizitaj helpe de Sabrina Endang Situmpol, membro de Couchsurfing, por plejparte aliaj membroj de ĉi tiu gastiga reto. Ŝi sukcesis aperigi artikolon pri Couchsurfing en *Batam Pos*, kaj aldoni ke mi venis por instrui Esperanton. Frapa frazo: "Heidi Goes memberikan kursus kilat. Para anggota yang awalnya benar-benar tidak mengerti bahasa Esperanto dalam dua malam sudah bisa menguasai teknik dasar bahasa tersebut." (Heidi Goes donis fulmrapidan kurson. La membroj, kiuj en la komenco tute ne komprenis Esperanton, post du vesperoj jam enkapigis la teknikan bazon de la menciita lingvo.) La foto kiu aperis kun la artikolo estas de miaj lernantoj kun la flago de Esperanto.

En la lasta tago mi instruis laŭ la peto de profesoro Ravi Ahmad Salim en la universitato Gunadharma en Depok (inter Bogor kaj Jakarta). Ĉeestis pli ol 200 studentoj. Unu el ili verkis poste artikolon por *Jurnal Bogor*. (vd. ankaŭ p. 4) En la artikolo la aŭtoro citas la pro-fesoron: "Memperkenalkan bahasa apapun terhadap mahasiswa merupakan cara universitas untuk menjembatani komunikasi dengan berbagai negara, apalagi Esperanto ini cukup mudah dikuasai, anggap saja sebagai comparative study." (Konatigi kiun ajn lingvon al la studentoj estas maniero por transpontigi komunikadon kun diversaj landoj, krome ĉi tiu Esperanto estas sufiĉe facile regebla, vidu tion simple kiel komparan studon.)

Por legi la tutajn artikolojn kaj pliajn originalaĵojn vizitu <http://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/artikoloj-aperintaj/enindonezio> kie troveblas la artikoloj kaj, se ekzistas reta versio, ankaŭ ligoj al ĝi.

Heidi Goes

Surprizo tre valora!

Loĝante preskaŭ dudek jarojn en Aŭstralio sen viziti Indonezion, mi ne povis rifuzi la tre amikan inviton de Heidi Goes ĉeesti la 39an Internacian Vegetaranan Kongreson en Ĝakarta. Kompreneble mi kaj mia edzo Alan volonte akceptis la rolon informi kongresajn ĉeestantojn pri nia valora lingvo Esperanto kaj noti la adresojn de interesiĝantoj.

Kiel gastoj, kune kun aliaj partoprenantoj ĉe komforta hotelo, ni estis kolektitaj ĉiumatene kaj veturigitaj al la giganta moderna kongresejo, kiu nepre ofte okazigas plurajn grandajn eventojn samtempe. Per lifto ni atingis la ĝustan etaĝon kaj nian menditan tablon en salono plenigita per nutraĵofertantaj budoj, el kiuj la plejmulto ofertis surloke kuiritajn manĝetaĵojn kun tre allogaj aromoj. Kunlabore kun du lokaj entuziasmaj lernantoj, Ilia kaj Acy, ni sukcesis aranĝi kun Heidi efikan vicordon por deĵorado ĉe nia informplena tablo dum la tuta semajno. Estis ege agrable renkonti tiom da interesatoj, plejparte gelernantoj el duagradaj lernejoj. Pro tio estis mirinde ke Heidi ankaŭ sukcesis aranĝi Esperanto-lecionon en aparta ĉambro. Proksimume tridek ĉeestantoj vigle atentis, notis kaj laŭte ripetis. Espereble ili daŭrigos la lernadon.

Permesu al mi en ĉi tiu momento laŭdi plenkore la iniciatemon, la laboron, la kuraĝon kaj la sindediĉon de Heidi por la diskonigo de Esperanto refoje tra la tuta Indonezio. Dum tiu tre plena semajno, Heidi eĉ sukcesis helpi la lokan grupon fondi Esperanto-klubon en Ĝakarta. La proksimume dek ĉeestantoj meze de tre moderna butikaro diskutis nomojn kaj elektis la tre allogan kaj signifoplenan "Esperiga suno".

Post tiu ege impresa semajno ĉe luksa homplena evento, mi kaj mia edzo deziras al la nova klubo amikan, amuzan sed ankaŭ entuziasman vivon cele la diskonigon kaj lernadon de Esperanto tra la tuta lando. Kompreneble ni ankaŭ esperas iam renkonti membrojn ĉe internacia Esperanto-evento.

Jennifer Bishop

Yohanes Manhitu (n. 1976)

Esperanto-poeto

Esperantlingve vi verkas poemojn por mondo nomiĝanta Esperantujo, kie la lingvo ja estas Esperanto – ilo mirinda por interkompreno.

Esperantlingve vi sentas kaj pensas laŭ la ordo de via poeta universo, kie eĉ artefaritaĵo havas belecon, kiun havas Esperanto ekde la komenco.

(2010)

La aŭtoro de la *Multlingva frazaro* (vd. p. 8) estas ankaŭ premiita poeto. Pasintjare aperis libroforme lia unua kolekto de poemoj en Esperanto, titolita *Sub la vasta ĉielo*. La 161-paĝa libro enhavas pli ol 200 poemojn. Por pliaj informoj kaj por mendoj vizitu la retejon de la eldoninto: <http://www.mondeto.com/>. Ĉi-supre ni aperigas specimenan poemon el la libro.



63-jara franca esperantisto deziras korespondi rete en Esperanto kun indoneziano(in)o. Mi komencas lerni la indonezian lingvon. Interesoj: lingvoj, Esperanto, vojaĝoj, Indonezio, ĉiutaga vivo kaj multaj aliaj temoj. Robert Pontnau, naupont@aol.com.

Raporto pri la Esperanto-kurso en “Esperiga suno”



La Esperanto-kurso estas regula agado en la ĝakarta Esperanto-klubo “Esperiga suno”. Ĝi estas baznivela kurso por instrui Esperanton al komencantoj. La kurso okazas dum tri monatoj kun dufoja renkontiĝo en ĉiu monato. En ĉiu renkontiĝo la partoprenantoj de la kurso akiras materialon prenitajn el kelkaj Esperantaj libroj, ekz. *Kunci Esperanto*, *Poŝamiko* kaj *Esperanto per rekta metodo* de Stano Marček.

Ĝis nun la kurso jam okazis dum du periodoj. La unua periodo estis inter la 7a de novembro 2010 kaj la 9a de februaro 2011, kaj la dua periodo ekde la 27a de februaro ĝis la 29a de majo 2011. Tamen, ĉar kelkaj partoprenantoj komencis lerni nur malfrue, la dua periodo estis plilongigita ĝis junio 2011.

La kurson partoprenas kaj membroj de la klubo kaj aliaj personoj, kiuj ne estas klubanoj. En la unua periodo la partoprenantoj estas 16, tamen ne ĉiuj partoprenis la tutan kurson. Sekve nur kvar homoj partoprenis la ekzercan parton en la fino de la kurso. Dume, en la dua periodo la partoprenantoj de la kurso estas 18. Ni uzas interagan instrumentodon por kune lerni. Do, ĉiuj povas diskuti la materialon inter si. En la kurso ni trafis kelkajn obstaklojn, inter kiuj estas la neregula ĉeesto de la partoprenantoj, ilia nesufiĉa motiviĝo, la loko de la kurso, kiu ne estas taŭga por lerni ktp. Malgraŭ tio la Esperanto-kurso daŭre okazas por disvastigi Esperanton en Indonezio, precipe en Ĝakarta kaj apudaj urboj.

Laporan tentang kursus Esperanto di “Esperiga suno”

Kursus Esperanto adalah kegiatan rutin di klub Esperanto Jakarta, “Esperiga suno”. Kursus ini adalah kursus dasar untuk memperkenalkan Esperanto kepada para pemula. Kursus berlangsung selama 3 bulan dengan 2 kali pertemuan setiap bulannya. Didalam setiap pertemuan, para peserta kursus mendapatkan materi pelajaran yang diambil dari beberapa buku pelajaran Esperanto antara lain buku *Kunci Esperanto*, *Poŝamiko*, dan *Esperanto per rekta metodo* oleh Stano Marček.

Saat ini, kursus telah diadakan sebanyak 2 periode, dengan periode pertama yang dimulai pada tanggal 7 November 2010 sampai 9 Februari 2011. Kemudian periode ke 2 dimulai dari tanggal 27 Februari sampai 29 Mei 2011. Akan tetapi karena adanya beberapa peserta kursus yang baru mulai ikut belajar, maka periode ke-2 diperpanjang sampai Juni 2011.

Para peserta kursus adalah anggota klub Esperanto dan juga beberapa orang umum. Pada periode I, peserta berjumlah 16 orang, akan tetapi tidak semua konsisten untuk mengikutinya. Sehingga yang mengikuti ujian apa akhir periode I hanya 4 orang. Materi ujian yang diberikan berupa tulisan dan mendengar. Sementara pada periode ke-2 ini, peserta berjumlah 18 orang. Adapun metode pengajaran yang digunakan adalah metode interaktif yang memungkinkan para peserta belajar bersama dan saling berbagi dalam mendiskusikan materi dan masalah yang ditemukan selama belajar.

Dalam melaksanakan kursus ini ada beberapa kendala yang dihadapi antara lain kehadiran peserta yang tidak konsisten, motivasi belajar peserta yang kurang, tempat kursus yang tidak sesuai untuk belajar, dan lain sebagainya. Akan tetapi meskipun ada kendala, namun kursus dasar Esperanto ini akan terus dilaksanakan sebagai upaya untuk memperkenalkan Esperanto dan mengembangkan Esperanto di Indonesia, khususnya di kota Jakarta dan sekitarnya.

Ilia Sumilfia Dewi

*la sekretario de la Ĝakarta Esperanto-klubo
Sekretaris Klub Esperanto Jakarta*

Belajar Esperanto di pulau Batam

Saya mengenal bahasa Esperanto dari Heidi, teman dan guru saya yang berkunjung ke Indonesia untuk mengajar bahasa Esperanto di beberapa kota di Indonesia dan termasuk Batam kota tempat saya tinggal. Kursus kilat yang diadakan Heidi hanya berlangsung sekitar 3 jam dalam 2 malam berturut-turut tapi itu sudah cukup untuk mengerti konsep dasar dari bahasa Esperanto itu sendiri.

Karena saya merasa tertarik dan ingin menguasai bahasa Esperanto sebaik saya menguasai bahasa Inggris, saya pun belajar sendiri dengan beberapa buku panduan yang diberikan Heidi termasuk kamus sederhana, serta ada website-website yang berhubungan dengan bahasa Esperanto dan majalah bulanan *Esperanto* sangat membantu saya dalam belajar lebih lagi. Saya tertarik dengan bahasa Esperanto yang sederhana, baik dalam pengucapan yang sama seperti bahasa Indonesia maupun pembentukan kosa kata kosa kata baru.

Karena itu saya sangat ingin sekali bisa berkomunikasi langsung dengan baik dalam bahasa Esperanto dengan esperantis-esperantis lain baik dari dalam maupun luar negeri. Dan suatu saat ketika saya sudah bisa lebih baik dari sekarang, saya mau berbagi dan belajar bersama teman-teman saya yang mau mengenal dan belajar bahasa Esperanto dan bersama-sama mengembangkan bahasa ini di kota saya. Jadi orang-orang tidak hanya bisa berbicara bahasa Inggris selain bahasa ibu mereka sendiri tapi juga bisa berbicara bahasa Esperanto yang juga merupakan bahasa internasional.

Heidi, mia amikino kaj instruistino, lernigis Esperanton al mi kaj kelkaj gemikoj miaj en Batam, Indonezio. Ĉar mi interesiĝas pri Esperanto, mi do lernas ĝin pere de kelkaj libroj kaj interreto. Mi pensas ankaŭ ke Esperanto estas ne malfacila sed simpla, ĉar ni povas fari novajn vortojn el unu vorto. Mi provas lerni Esperanton kaj mi deziras paroli ĝin, kaj kune kun miaj gemikoj disvastigi la lingvon en mia urbo. Do, ili komprenos ke ankaŭ Esperanto estas universala lingvo.

Endang Sabrina Sitompul

Mallonge

Zamenhof-tago en la klubo "Esperiga suno" en Ĝakarta

Ne longe post sia fondiĝo, la 3an de oktobro 2010, la ĝakarta E-klubo "Esperiga suno" jam havis unuan feston, la 15an de decembro 2010, kompreneble okaze de la naskiĝtago de Zamenhof. La festado estis grava okazo por la lernantoj ekkoni la kreinton de Esperanto per liaj poemoj kaj vivhistorio. Krome ĉiuj dek ĉeestantaj membroj havis la okazon prezenti sin mem en Esperanto. Kiel lasta programero, ĉiuj gustumis bongustan kukon, kiu havis specialan aspekton por la Zamenhoftago.

Indonezianoj en Komuna Seminario



En Vjetnamio okazis de la 18a ĝis la 20a de decembro 2010 Komuna Seminario (antaŭe kutime organizita en Ĉinio, Japanio aŭ Koreio). Danke al subvencio de KAEM (Komisiono pri la Azia Esperanto-Movado de UEA, <http://www.kaem.org/>) por la unua fojo partoprenis du junaj indonezianoj: Haris Abdul Adnan kaj Ilia Sumilfia Dewi (vidu la apudan foton), estraranoj de la ĝakarta E-klubo "Esperiga suno". Samtempe tio estis por ili la unua internacia renkontiĝo kaj do tre grava sperto, kiun ili povas uzi en sia instruado en Ĝakarta. Pli detale en venonta numero.

Ilia Sumilfia Dewi (vidu la apudan foton), estraranoj de la ĝakarta E-klubo "Esperiga suno". Samtempe tio estis por ili la unua internacia renkontiĝo kaj do tre grava sperto, kiun ili povas uzi en sia instruado en Ĝakarta. Pli detale en venonta numero.

Indonezianoj kongresos en Eŭropo

Lastmomente ni eksciis ke Ilia Sumilfia Sondang Dewi kaj Endang Sabrina Sitompul ricevis la malfacile akireblan Schengen-vizon por povi veni al Eŭropo kaj partopreni kelkajn E-aranĝojn, inter kiuj estas la ILEI-Konferenco kaj Universala Kongreso en Kopenhago, kaj la Somera Esperanto-Studado en Slovakio. Por ebligi ilian viron, pluraj esperantistoj jam kontribuis finance. Tamen ilia propra kontribuo ankoraŭ grandas, do daŭre estas bonvena pli da helpo. Eblas ĝiri al la Triamonda Kongresa Fondaĵo de UEA kun la mencio: por indonezianoj. Koran dankon!

Rusino vizitos Indonezion



La 22an de julio 2011 al Indonezio iros E-instrucele s-ino Tatjana Loskutova, profesia lingvoinstruistino en unu el la superaj lernejoj de la urbo Ivanovo, Rusio. Dum sia E-vivo ŝi instruis Esperanton ne nur en sia hejmlando, sed ankaŭ en la iama Ĉeĥoslovakio, dum pluraj jaroj en Francio (kastelo Grésillon) kaj en Germanio (dum IF-oj). S-ino Loskutova ŝatus transdoni siajn E-sciojn al interesatoj en Indonezio, komencantoj kaj progresantoj, profundigi ilin en la atmosferon de la E-komunikado kaj prezenti spertojn de sia multfaceta E-

agado. Ŝi restos en Indonezio ĝis la 21a de aŭgusto. Por kontakto bonvolu anonciĝi ĉe Ilia Dewi (✉ ilia.dewi@gmail.com; ☎ 08111773387, ☎ 0218870835).

UEA-membroj en Indonezio

Jam de jardekoj estas jen kaj jen unu-du UEA-membroj en Indonezio, sed en 2011 estas pli ol iam ajn antaŭe: nome 29 membroj (meze de junio). Tio estas malmulta kompare kun la grandeco de la lando, sed grandega kresko ene de nur du-tri jaroj. Tio eblis grandparte pro la subteno de individuaj esperantistoj al la Fondaĵo Canuto, kaj kompreneble ankaŭ pro tio ke nun estas en tiu insularo pli da E-parolantoj ol antaŭ kelkaj jaroj.

Ni esperas ke la revuoj kiujn ili ricevas (*Esperanto* kaj, por multaj ankaŭ, *Kontakto*) helpas al ilia lernado de la lingvo kaj konscio pri la internacia E-movado. Certe pluraj el tiuj revuoj estos legataj de pli ol unu persono, kiel ekzemple en la klubo de Bogor, kie la instruistoj regule kunvenas por kune lerni la lingvon.

Ĉi-jare aperas denove, post paŭzo, Delegito en Indonezio. Temas pri la tre aktiva sekretario de la ĝakarta klubo "Esperiga suno", s-ino Ilia Sumilfia Dewi. En la venontaj jaroj ni antaŭvidas eĉ pli da Delegitoj.

Ni dankas al la subtenintoj de la Fondaĵo Canuto kaj deziras fruktedonan (kun)laboron al la membroj kaj la aliaj indoneziaj esperantistoj!

Lernu! ankaŭ por indonezianoj

La multlingva retejo www.lernu.net nur antaŭ kelkaj semajnoj estis sufiĉe tradukita por videbli en la listo de elekteblaj lingvoj sube en la retpaĝo. Tiu atingi estas plejparte dankenda al Pryo Handoko, kiu tute memstare eklernis Esperanton kaj nun estas estrarano de la E-klubo de Bogor "Ĉielarka revo".



Ankoraŭ mankas iom da tradukoj kaj ankaŭ necesas kontrollegi la jam tradukitajn paĝojn, do aliaj spertaj indoneziaj esperantistoj estas petataj kunlabori. Kompreneblas ke tiu traduko multe helpas al la indoneziaj komencantoj por pli facile trovi sian vojon en tiu ampleksa sed tre utila retejo. La adreso de la indonezia versio estas <http://id.lernu.net/>.

Kontribuu per viaj memoroj!

Se eblas hazarde renkonti homojn en Indonezio kiuj memoras ke antaŭ 50 aŭ pli da jaroj ili eklernis Esperanton... tiam certe eblas trovi homojn en Esperantujo kiuj memoras ke ili korespondis kun indoneziaj esperantistoj, aŭ renkontis ekzemple Kho Kwat Liat (poste Eriko Sunardo) aŭ Datoe Toemenggoeng dum iu Universala Kongreso. Heidi Goes daŭre esploras pri la historio de la movado en Indonezio, kaj tre aprezus vian kontribuon. Ne pensu ke via memoraĵo estas malgranda. Ĉio povas esti grava por rekonstrui la tiaman movadon. Tio gravas kaj por la ĝenerala Esperanto-movado kaj por la ĝermanta movado en Indonezio. Sendu viajn memoraĵojn, fotojn, leterojn, demandojn al heidi.goes@gmail.com. Antaŭdankon!

En 2009 la Oceania Komisiono de UEA eldonis la *Multlingvan frazlibron* de la indonezia poeto kaj tradukisto Johannes Manhitu. La libro enhavas centojn da esprimoj grupigitaj laŭ temoj, en la lingvoj Esperanto, indonezia, davana, tetuma, kupanga, angla, franca, hispana, portugala. La 143-paĝa libro mendeblas ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 7,50 €.



Tanggal terakhir untuk kirim artikel buat buletin yang berikut adalah 30 Oktober. Kalau mau menjadi anggota redaksi buletin ini, atau mau kirim artikel buat buletin yang akan datang, tolong kirim pesan ke redaksi: redakcio-ideo@googlegroups.com.

La limdato por la sekva bulteno estas la 30a de oktobro. Se vi emas iĝi membro de la redakcio de ĉi tiu bulteno aŭ volas kontribui ion, mesaĝu al la redakcio: redakcio-ideo@googlegroups.com.